

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

\* dumonata kristana revuo en esperanto \* n-ro 5 (860) \* 2006



## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021;  
✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,  
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;  
☎ +31 1724 20222;  
✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,  
DE 74074 Heilbronn, Germanio;  
☎ +49 7131 162688;  
✉ SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- \* Membro-subtenanto €30,- \* Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- \* pagante al Libroservo €18,- \* Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. \* Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **keli-p** de KELI \* Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;  
☎ +46 (70) 2004574;  
✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel Polnický; Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;  
☎ +420 325 615 651;  
✉ Cea.polnický@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

## ENHAVO

Jona	103
Sub la sankta signo de l'espero	107
Soldatoj, atletoj kaj terkultivistoj	108
Invito al la ekumena kongreso	113
Aliĝilo al la ekumena kongreso	115
Perloj de Saĝeco: la sentencoj de Salomono	118
Preĝejoj tur-kokoj	119
Voĉoj kristanaj - recenzo	120
Patrino perdinta filinon	121
Informetoj	123
Ĉar vi elektis	124

## REDAKTORAJ VORTOJ

Esperable vi havas la saman ĝojon kiel mi, kiam vi malfermas novan numeron de Dia Regno. Kvankam mi bone scias la enhavon, mi scivolos, ĉu ĝi bone kaj inspirige aspektas. Poste mi multe ĝojas, se iu favore komentas la revuon. Kaj sufiĉe ofte tio okazas. Mi multe dankas kaj al la komentoj kaj al la kontribuoj, kiuj daŭre alvenas. Nia revuo vivas pro tiuj kontribuoj. Mi esperas, ke mi povas redoni viajn kontribuojn laŭ via intenco.

Aliloke mi recenzas unu libreton el la serio *Voĉoj Kristanaj*, kiun Gerrit BERVELING eldonas. La nomon de tiu serio mi ŝatus uzi ankaŭ por tiu-ĉi numero de nia revuo. Vi trovos plurajn artikolojn, kiuj sia-maniere volas aŭdigi la voĉon de Dio por ke ni atentu pri Lia kaj Lia volo.

La fronta paĝo montras kokon sur preĝeja turo en Stokholmo. La koko estas la simbolo de atentemo. Vidu ankaŭ artikoleton sur paĝo 119.

# Jona

Prediko dum KELI-kongreso, la 13-an de aŭgusto 2006

Jona 4:5-11

Philippe COUSSON, FR

**K**araj gefratoj, vi ĉiuj almenaŭ aŭdis pri la historio de Jona. Mi iomete resumos la rakonton, poste mi ekzamenos la tekston kaj vidos, kion ni povas kompreni por ni hodiaŭ.

5 Jona eliris el la urbo, sidiĝis oriente de la urbo, faris al si tie laŭbon, kaj sidiĝis sub ĝi en la ombro, ĝis li vidos, kio estos kun la urbo. 6 Dume Dio, la Eternulo, pretigis hederon, kaj ĝi elkreskis super lian kapon, por ke li havu ombron super sia kapo kaj liberiĝu el sia suferado. Kaj Jona forte ekĝojis pro la hedero. 7 Sed kiam leviĝis la matenruĝo de la sekvanta tago, Dio aperigis vermon, kiu difektis la hederon, kaj ĝi forvelkis.

Jona 4:5-7

Jona estis profeto, ĉar li ricevis de Dio mesaĝon por diri al la loĝantoj de Ninive. Tiu mesaĝo estas: “Pentu, ĉar viaj malbonagoj atingis min. Pentu por eviti detruon.”



Sed Jona ne volis doni tiun mesaĝon al la fremduloj kaj malamikoj el Ninive. Li decidis fuĝi en la alian direkton, per la maro al Tarŝiŝ.

Dum li vojaĝis,

Dio okazigis ventegon, kaj la ŝipo preskaŭ pereis. La vojaĝantoj serĉis la kaŭzon, preĝis siajn diojn, escepte de Jona, kiu dormis. Kaj ili lotumis por trovi la kaŭzon. La sorto indikis Jonan, kiu klarigis la situacion, kaj petis ke oni ĵetu lin en la maron por ke la ŝtormo finiĝu. Ili tion faris. Fiŝo englutis lin. Kaj en la ventro de la fiŝo li kantis preĝon. La Eternulo aŭdis kaj la fiŝo vomis lin sur la teron. Li fine iris al Ninive, kaj komencis prediki. La Niniveanoj pentis, kaj Dio deklaris ke la urbo ne estos detruata.

Tio malplaĉis al Jona, kiu vere ĉagreniĝis. Kaj tie komenciĝas nia teksto.

Kiam oni rigardas tiun tekston laŭ la originala formo, strukturo tuj aperas. Ĉiu versiklo komenciĝas per verbo:

- versiklo 5 estas agado de Jona, kiu eliras el la urbo,
- versikloj 6 kaj 7, kaj 9 kaj 10, kaj la kvara vorto de versiklo 8 estas agadoj de Dio,
- versiklo 11 komenciĝas per “mi”, kiun diras Dio.

En tiu teksto Dio estas nomata de la du manieroj ĉefaj en la Malnova Testamento: Dio kaj la Eternulo (*Elohim* kaj *Yahve*).

La tri menciitaj unuaj agadoj de Dio estas “aperigi”. Estas trifoje la sama

verbo en la hebrea. Li aperigis hederon, poste vermon, kaj poste venton. Li jam aperigis alian venton en la rakonto pri la ŝtormo dum la ŝipvojaĝo.

En la versikloj 9 kaj 10, Li parolas al Jona.

La versiklo 8 komenciĝas per tiu sama vorto kiu en la komenco de Genezo indikas la ekeston: “Estu lumo, kaj

8 Kaj kiam ekbrilis la suno, Dio aperigis bruligan orientan venton, kaj la suno turmentis la kapon de Jona tiel, ke li senfortiĝis kaj petis por si morton; li diris: Pli bone por mi estas morti, ol vivi. 9 Tiam Dio diris al Jona: Ĉu vi havas grandan ĉagrenon pro la hedero? Li respondis: Mi havas grandan ĉagrenon, eĉ ĝis deziro al morto.

Jona 4:8-9

estis lumo”. Kaj ĉi tie tekstas: “Kaj estis varma suno.” Tiu varma suno aperas kvazaŭ Dio aperigas ankaŭ ĝin.

Ni nun rigardu kion faras Jona.

Li eliras el la urbo, oriente de la urbo, eble de tie oni pli bone vidas la urbon. Kaj tie li konstruas laŭbon. Kaj tiu gesto rememorigas nin pri la festo de la laŭboj, kiam la hebrea, memore al la vojaĝo en la dezerto, konstruis en la ĝardeno provizoran loĝejon, kabanon, laŭbon el branĉaĵoj por dormi dum certa tempo. Tiu festo signifas ke, kvankam ili nun vivas en bona domo, dum periodo ili vivis en la dezerto, kaj tiam ili dependis de Dio kaj ricevis ĉion de Li.

Alia agado de Jona estas plendi. Antaŭ tiu perikopo li jam plendis, ke

Dio indulgis al la Niniveanoj kaj ne detruis la urbon. Li ĉagreniĝis pro tio.

Kaj nun, pro la malapero de la planto kiu superombris lin, li ankaŭ ĉagreniĝis kaj plendis.

Kiam li konstatis ke tiu planto kreskis, li estis feliĉa. Ja ardis la suno. Tiu ombro estis kvazaŭ donaco de Dio, de providenco. Eble la laŭbo ne sufiĉis. Li estis tiel feliĉa, ke, kiel diras la hebrea, li ĝojis grandan ĝojon. Kaj unu vespero, kaj unu mateno, kaj ne plu da vegetala ombro. Krome estis suno, estis vento, kaj denove malespero, ĉagreno, plendo ĉe Jona. Plendo ĝis peto de morto. Tiun sintenon li jam havis tuj antaŭ nia hodiaŭa teksto.

Mi venas al la vorto, kiu estas tradukita diversmaniere laŭ la lingvoj. Hebree ĝi estas *qiqayon*. La traduko varias ekzemple en Esperanto hedero, en la franca ricino, en la angla kukumo, en la germana arbusto. La vorto *qiqayon* havas nune en la hebrea la signifon ricino, sed pluraj komentistoj de la teksto diras ke plej probable temas pri iu specio de kukumo kiu efektive tre rapide kreskas.

La cetera rimarko estas ĉefe esperant-lingva. la verbo uzata en versikloj 10 kaj 11, kiu estas en Esperanto tradukita per la verbo *domaĝi* estas en la hebrea proksima al la vorto kiu signifas gracon.

Tiu verbo en Esperanto havas signifon tian ke ĝi estas malfacile tradukebla en la francan almenaŭ, kvankam la deveno estas certe franca vorto, sed kun

malsama signifo.

La Plena Ilustrita Vortaro indikas por “domaĝi”: timi difekton, timi perdon, deziri konservi, deziri ne difekti, timi ofendi, indulgi, kaj “domaĝo” estas perdo kiun oni volus eviti.

Proksima parenca vorto estas “damaĝo”, kiu signifas : perdo, detruo pro iu, pro ies agado.

Kaj en proksimeco de signifo ekzistas ankaŭ : "kompato" : sento de kortuŝo pro ies malfeliĉo, kaj ankaŭ “indulgo”: malsevereco, pardonemo, ne-ofendo.

Kaj tiu malfacila vorto estas mia ŝlosilo de tiu teksto.

Ni pensu unue pri Jona. Pri kiu domaĝo li parolas? Kion li efektive domaĝas? Fakte sin mem. Ne la hederon, aŭ kukumon, aŭ ion ajn li domaĝas, sed la ombron kiun li ricevis. La naturon li uzis, en tio ke li nenion faris por ricevi ĝin. Pri tiu planto li ne zorgis, kaj nun li domaĝas ĝin. Fakte li ne domaĝas la planton, ne domaĝas la aliajn homojn, la Niniveanojn, aŭ la bestojn. Li domaĝas sin mem, kaj sian komforton. Li konstruis laŭbon, sed ne rememoris sian dependon de Dio. Li tiel rapide iras de ĝojo al ĉagreno, ke videble li interesiĝas nur pri sia sorto.

Kaj nun ni rigardu al la alia kiu domaĝas, al Dio. Li domaĝas Niniven, la homojn en Ninive, la bestojn tie. Ni simple ankaŭ pensu al pluraj paraboloj de Jesuo, kie troviĝas ĝojo. Male al la ĝojo de Jona pro la ombro, estas en la Evangelio la ĝojo pro la ŝaviĝo de aliaj, la ĝojo pro la retrovo de perditoj. La tuta Biblio parolas pri la amo de Dio

por la mondo, parolas ankaŭ pri la espero por la universo. Fakte ni devas kompreni ke Dio domaĝas la tutan

10 La Eternulo tiam diris: Vi domaĝas la hederon, pri kiu vi ne laboris kaj kiun vi ne edukis, kiu dum unu nokto elkreskis kaj dum unu nokto pereis; 11 kaj ĉu Mi povus ne domaĝi Nineven, la grandan urbon, en kiu troviĝas pli ol cent dudek mil homoj, ne povantaj distingi inter sia dekstra mano kaj sia maldekstra, kaj krom tio multe da brutoj?

Jona 4:10-11

mondon.

Jona atendis, deziris la detruon de la urbo. Li tute ne domaĝis la Niniveanojn. Ili ja estis fremduloj, alireligianoj, alirasanoj, kaj krome ankaŭ malamikoj.

Nune multaj parolas pri la medio, pri ekologio, pri la naturo, pri konservo de la kreo.

Se ni domaĝas la medion, ĉu estas, en fina analizo, ĉar ni domaĝas nin mem? Aŭ ĉu estas ĉar ni domaĝas la estontajn homojn? Ĉu ni domaĝas la bestojn, la plantojn?

Kiam homoj protestas pro risko de polucio, ĉu vere ili ne domaĝas sin mem laŭ la principo NIMBY, “not in my backyard”, ne en mia malantaŭa korto, t.e. estas prefere eble ĉe la alia ? Ĉu tiel oni ne domaĝas la ali-io-anojn, alilandanojn, alirasanojn? Ne, ĉe mi, sed ĉe ili kial ne?

Kial tiu nunepoka vekiĝo pri ekolo-

gio? Kiu vekis nin?

Ĉu la nunaj damaĝoj al la medio, ĉar estas domaĝe al ni? Tiam ni efektive domaĝas nin mem, kiel Jona.

Ĉu la damaĝoj al la kreado, al la homoj, al ĉiuj homoj, nunaj kaj estontaj, al niaj kunuloj kaj najbaroj, tamen ne nur al niaj sampopolanoj, samkredanoj, samrasanoj? Tiam eble ni vere domaĝas la tutan kreon de Dio, ĉiujn homojn.

Sed efektive, plej ofte, kion ni domaĝas?

–Ĉu nian komforton, kaj tiun de niaj proksimuloj, parencoj?

–Ĉu nian famon, nian fieron?

–Ĉu nian potencon, nian sendependecon?

–Aŭ ĉu ni domaĝas niajn samtempulojn? la homaron nunan kaj estontan? la tutan kreon de Dio, kiel spegulon de Dio mem, bildon de lia saĝeco?

Kaj por povi ĝuste respondi tiun demandon ni ankaŭ bezonas kompreni ion alian, aluditan ankaŭ en la libro de

Jona, kio estas justeco, kio estas la justeco de Dio.

Justeco povus esti : kondamno de la Niniveanoj, ĉar efektive ili estis teruraj pekantoj, idol-adorantoj, sangavidaj militistoj, kiel pensis Jona.

Sed la justeco de Dio estas alia. Ĝi estas savo kaj espero, espero kaj savo, al ĉiuj homoj, kaj bestoj, kaj ankaŭ al la tuta universo.

Mi do ĉi-matene volas lasi al vi tiujn du demandojn:

–Pro kio, pro kiu vi ĉagreniĝis?

–Kion, kiun vi domaĝas?

Kie estas via trezoro, tie troviĝas via koro, diras la Evangelio. Bona maniero identigi tiun trezoron estas respondi tiujn du demandojn :

Pro kio, pro kiu vi ĉagreniĝis?

Kion, kiun vi domaĝas?

Amen

## La Regno de Dio laŭ la agoj de la Apostoloj 14

21 Kaj proklaminte la evangelion al tiu urbo, kaj varbinte multajn disĉiplojn, ili revenis al Listra kaj Ikonio kaj Antioĥia,

22 firmigante la animojn de la disĉiploj, kaj admonante, ke ili restu en la fido, kaj ke tra multaj suferoj ni devas eniri en la regnon de Dio.

# Sub la sankta signo de l' espero...

Vesperpreĝo tuj post la interkona vespero dum la KELI-kongreso 2006

Jacques TUINDER, NL

**E**n la vivo-alfabeto de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kies pseŭdonimo estis D-ro Esperanto (N.B. Afero, Beno, Celo, ktp), la litero E ne povas ne esti la vorto ESPERO.

Cetere ankaŭ en la mia, kiam mi antaŭ kvardek jaroj esperplene kaj kuraĝe iniciatis agadon por homoj kun vidhandikapo per la alvoko: Esperantistoj, Esperigu Esperantojn.

Pri ESPERO pastro Petro Ceelen skribis tre belajn vortojn en la verketo pri sia alfabeto de plej necesaj vivrimedoj: “La vivo de ni ĉiuj komenciĝis per tio, ke nia patrino pleniĝis de espero. Rimarkinde! Anstataŭ esti esperplena, ĉiu graveda virino havas fortajn motivojn por esti timema. Ĉu ŝi, naskante, ne riskas la propran vivon? Ĉu ŝia infano forlasos sendamaĝe la mallarĝanelirejon?”

Malgraŭ ĉi ĉio la plej multaj gravedulinoj havas bonan esperon. Ili esperas enmondigi sanan infanon. Ĉiu ido enkorpiĝas esperon. Dum naskiĝas infanoj, Dio pravas havi esperon. Ĉiu infano nov-naskita estas portanto de espero. Ĉiu infano povus esti la Mesio; tiel kredas la judoj, kiuj tial aborton malpermesas.”

D-ro Esperanto en 1887 naskis spiritan infanon, kiun ni ĉiuj danke akceptis en nian vivon, ĉiutage spertante kiom la bona lingvo ĝojigas kaj riĉigas nin. Ĝi vokis nin ankaŭ al ĉi tiu loko, kie

parto de la kara KELI-familio kongresas, kompreneble uzante Esperanton.

Kaj ni certe esperas, ke KELI iom post iom renaskiĝos. Treege necesas naski novajn adeptojn por la Esperantomovado kaj membrojn por nia Ligo. Ni ja vivu de espero, ĉar sen espero ni estas kiel mortintoj.

Rusa proverbo al ni instruas ke 'kiel lasta mortas la Espero'. Kaj tute certe ni, kristanoj, vivas de espero kaj de promeso.

Petro Ceelen belege finas la ĉapitron dediĉitan al Espero. Bonvolu lin aŭskulti:

“Vi sciuj, surbaze de kio mi havas la certecon ke la vivo bone finiĝos kaj ne finiĝos en sakstrato. Mi ne havas senduban, objektivan certecon, sed mi estas certa, ke la morto ne mortigos min kaj ke ekzistas elirejo.

Ankaŭ la enirejo en la vivon estas tre mallarĝa. Sed tra ĝin ni ennaĝis en la vivon. Kaj tiel ni tra malluman tunelon vojaĝos al la lumo.

Mi havas bonan esperon - kiel iam patrino mia!”

Ke ni, esperantistoj, komencu nian kongreson kun granda espero en la koro. Mi - unu el vi - forte esperas, ke vi kaj mi havos antaŭ ni ripozoplenan nokton, por ke ni morgaŭ, renaskotaj, denove kolektiĝu 'sub la sankta signo de la Espero'.

Bonan nokton!

# Soldatoj, atletoj kaj terkultivistoj

Instrukcioj por la kristana vivo

Elmer ESCOTO

1 Vi do, mia filo, fortikiĝu en la graco, kiu estas en Kristo Jesuo. 2 Kaj kion vi de mi aŭdis inter multaj atestantoj, tion transdonu al fidelaj homoj, kompetentaj instrui ankaŭ aliajn. 3 Vi do elportu suferojn, kiel bona militisto de Jesuo Kristo. 4 Neniu militanto sin implikas en la aferojn de ĉi tiu vivo; por ke li plaĉu al sia varbinto. 5 Kaj se iu konkuras kiel atleto, li ne estas kronata, se li ne laŭregule konkuris. 6 La laboranta terkultivisto devas la unua partopreni en la fruktoj. 7 Konsideru tion, kion mi diras; ĉar la Sinjoro donos al vi komprenon pri ĉio. (2 Tim 2:1–7)

## v.1 Fortikiĝu.

→ ἐνδυναμῶ endunamoō; Prenu forton, fariĝu forta

■ En multaj lokoj de La Skriboj nia Sinjoro ordonas al ni tion. Ekzemple:

**Jos 1:9** *Jen Mi ordonis al vi: estu forta kaj kuraĝa; ne havu teruron kaj ne timu; ĉar kun vi estas la Eternulo, via Dio, ĉie, kien vi iros.*

**Efe 6:10** *Cetere, fortiĝu en la Sinjoro kaj en la forteco de lia potenco.*

**Flp 4:13** *Mi ĉion povas fari en tiu, kiu min fortikigas.*

■ Plej ekzakte, la vorto signifas “vestiĝi per potenco” (el la greka “dunamis”)

- Tiu ĉi estas la potenco per kiu ni venkas la karnon, la mondon, la diablon, la timon. Ĝi estas la povo per kiu ni supervenkas en ĉio.
- Tiu potenco ne venas de ni mem
- Tiun potencon ni atingas per la graco (superabundan riĉecon de Sia graco, Efe 2:7)

**2 Kor 12:9** *Kaj li diris al mi: Mia graco sufiĉas por vi, ĉar mia potenco perfektigas en malforteco. Plej ĝoje do mi plivole fieros pri miaj malfortaĵoj, por ke la potenco de Kristo kovru min.*

**Isa 41:10** *ne timu, ĉar Mi estas kun vi; ne maltrankviliĝu, ĉar Mi estas via Dio; Mi vin fortigos, Mi vin helpos, Mi vin subtenos per Mia justa dekstra mano.*

En Kristo Jesuo.

Ĉio estas en Kristo Jesuo. La kerno de la revelacio kiun Paŭlo ricevis de Dio estas tio. Tra la Paŭlaj skriboj ni trovas frazojn kiajn “en Kristo”, “en la Amata”, “en Li”, “en Jesuo”.



- \* Li favoris nin → en la Amata (Efe 1:6)
- \* Ni havas elaĉeton → En Kristo Jesuo (Efe 1:7)
- \* Ni baptiĝis → En Kristo Jesuo (Gal 3:27)
- \* Mortintoj al peko, sed vivantoj → En Kristo Jesuo (Rom 6:11)
- \* Eternan vivon → En Kristo Jesuo
- \* Nenia kondamno → En Kristo Jesuo (Rom 8:1)
- \* Leĝo de la Spirito de vivo → En Kristo Jesuo (Rom 8:2)
- \* Nenio apartigos nin de la amo de Dio → En Kristo Jesuo
- \* Ni estas unu korpo → En Kristo Jesuo
- \* Ni sanktiĝis → En Kristo Jesuo
- \* Saĝaj → En Kristo Jesuo
- \* Ĉiam triumfe → En Kristo Jesuo (2 Kor 2:14)

**Joh 15:5** “*Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi, kaj mi en li, tiu donas multe da frukto; ĉar sen mi vi nenion povas fari*”.

**v.2 Ni ricevis la gracon,** kaj ni devas transmisii ĝin

■ aŭdi - instrui

- La fido venas per aŭdado – Tiel ni ricevis fidon por savo, kaj ni daŭre ricevas fidon por edifo.
- Ni devas do transmisii la gracon, la fidon. Tiu estis la mandato kiun Jesuo donis al ni:

**Mat 28:18-20** *Kaj Jesuo venis al ili, kaj diris al ili: Estas donita al mi ĉia aŭtoritato en la ĉielo kaj sur la tero. (19) Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; (20) instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi. Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.*

■ fidelaj homoj

“fidel-” = greka Pistós

Kredanto lojala kredebla

Homoj kiuj ne kapitulacias. Nia koro devas resti firma en Kristo, ni ne devas lasi erarajn doktrinojn forportu nin.

### **v.3,4 Militisto de Jesuo Kristo**

Tiu estas parabola maniero transdoni al ni la veron. Paŭlo ofte uzis tian komparon inter vivo kaj la milito, indikante al ni, ke ni estas soldatoj en la armeo de Dio. Ekzemple:

**1 Tim 6:12** *Batalu la bonan batalon de la fido ...*

**1 Tim 1:18** *...mi komisiis al vi, mia filo Timoteo, laŭ la profetaĵoj, kiuj antaŭiris sur vin, ke per ili vi militadu la bonan militon...*

**Flp 2:25** *Tamen ŝajnis al mi necese sendi al vi Epafroditon, mian fraton kaj kunlaboranton kaj kunbatalanton...*

**2 Tim 4:7** *Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon...*

### 1) Soldato devas plene dediĉiĝi

Li devas koncentriĝi en sia servo. La romanoj malpermesis al la soldatoj enmiksiĝi en civilajn aferojn, ĉar ili perdis koncentriĝon. Kristano devas koncentriĝi en Kristo. Tamen, ni havas multajn aferojn por fari, ĉar ni estas en tiu ĉi mondo, kaj ni devas labori, ni devas fari multajn aferojn neeviteblajn. Sed same, en la armeo, estas ekzemple artileriistoj, kuracistoj, komunikadistoj, inĝenieroj... sed ĉiuj kunlaboras al bono de la armeo. Same inter ni kristanoj. Ni estas pastoroj, aŭ instruistoj, aŭ evangeliistoj, aŭ ni ne laboras en tiaj areoj, sed ni estas kuracistoj, inĝenieroj, kontistoj, ktp. Sed ni, en nia okupiteco devas ĉiam fari ĉion por la gloro de Dio kaj profiti kian ajn okazon por montri nian fidon al Jesuo.

### 2) Soldato devas obei – kaj plene kredi je siaj superuloj

Obei nehezitante, ĉar tia obeo en ia momento povos savi lian vivon, kaj la vivon de multaj aliaj. Nia rolo ne estas demandi kial Dio ordonas ion aŭ alion. Nia devo estas tutsimple obei.

Unu soldato ne povas scii ĉion kio okazas dum la tuta kampanjo, same kiel li ne konas la grandegan kaj totalan planon.

La decidojn prenas la komandantoj, kiuj povas konsideri la tutan scenejon.

Same, kristano devas obei Dion, eĉ kiam tiu ne komprenas Dion, ĉar Dio scias ĉion.

### 3) Soldato devas esti preta volonte sin oferi

La virto de ĉiu bona soldato estas tio, ke li estas fidela, se necese, ĝis la morto.

Same, kristano devas esti lojala al Jesuo en ĉiuj kondiĉoj, eĉ ĝis la morto. En multaj niaj landoj, danke al Dio, ni havas liberecon adori, servi al Dio kaj preĝi kaj prediki. Kontraŭe en aliaj landoj la kristanoj estas daŭre persekutataj ĉu de la registaro, ĉu de aliaj grupoj, ĉu de ambaŭ. Ni kristanoj en libereco devas preĝadi, petegi, propeti pri la gefratoj en tiaj landoj. Sed eĉ ni en landoj kie ni povas libere adori al Dio foje suferas persekutadon. Ne de la registaro, ne de aliaj grupoj, sed de niaj familianoj, geamikoj, samlaborejanoj. Ni ne devas honti pri nia kristaneco, ĉar ankaŭ tiam ni povas montri nin fidelaj kaj lojalaj al Jesuo.

- Soldatoj havas kvartalojn – ni havas kirkojn, preĝejojn
- Soldatoj uzas specialajn radioaparatojn por komunikiĝi sen interfero – ni uzas preĝadon
- Soldatoj havas altan kodon pri etiko kaj konduto – Ni havas La Biblion

### GRAVE:

Soldato ne iras en batalon sola. Li ĉiam iras en batalon kun aliaj soldatoj kaj *nur kiam lia komandanto tion ordonas*. Estas tre strikta komandoĉeno. Same ĉe ni kristanoj. La plej alta ĉenero estas Jesuo kaj subenirante laŭ la komandoĉeno estas la pastoroj, presbiteroj, diakonoj... Ni devas submetiĝi al tiu komandoĉeno.

**Jer 3:15** *Kaj Mi donos al vi paŝtistojn laŭ Mia koro, kiuj paŝtos vin kun sciado kaj saĝeco.*

**Heb 13:17** *Obeu al tiuj, kiuj vin regas, kaj submetiĝu; ĉar ili viglas pro viaj animoj, kvazaŭ liveronte raporton; ...*

**1 Tes 5:12-13** *Sed ni petegas vin, fratoj, koni tiujn, kiuj laboras ĉe vi kaj estras ĉe vi en la Sinjoro kaj vin admonas, kaj estimi ilin treege kun amo pro ilia laboro. Estu pacemaj unu kun la alia.*

**1 Tim 5:17** *La presbiteroj, kiuj regas bone, estu rigardataj kiel indaj je duobla honoro, precipe tiuj, kiuj laboras super la vorto kaj instruado.*

**Rom 13:2** *Tiu do, kiu kontraŭstaras al aŭtoritato, rezistas al la ordono de Dio; kaj tiuj, kiuj rezistas, ricevos juĝon.*

## v.5 La Atletoj de Kristo

La parabolo pri atletoj estas ankaŭ ofte uzata en La Skriboj

Ilia konkuro estis ne hobia aŭ flankokupo. Ili plene dediĉiĝis al tio por ke ili povu digne konkuri

1) **Atleto** havas memdisciplinon, striktan sistemon de trejnado, ekzercado, striktan dieton. Ili ne forlasas la disciplinon. Ili persistis, kaj persistas, kaj persistos. Ni persistu, laŭ la jenaj versoj:

**Mat 10:22** *Kaj vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo; sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita.*

**Agoj 1:14** *Ĉiuj ĉi tiuj unuanime persistis en preĝado kaj petado, kun la*

*virinoj, kaj Maria, la patrino de Jesuo, kaj kun liaj fratoj.*

**Agoj 2:42** *Kaj ili persistis en la instruado de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj.*

**Efe 6:18** *per ĉia preĝado kaj petegado en ĉiu tempo preĝante en la Spirito, kaj viglante por tio en ĉia persisteco kaj petego por ĉiuj sanktuloj,*

2) **Atleto** konkuras laŭregule. Ĉia konkurado havas regulojn, sed ĝenerale, ĉiu sporto havas la saman bazan regulon: justa konkurado, honesta konkurado. Tio implicas, ke la atleto ne devas trompi la aliajn atletojn, ne devas malhelpi al aliaj atletoj konkuri.

**Gal 5:15** *Sed se vi mordas kaj manĝegas unu la alian, gardu vin, ke vi ne estu detruitaj unu de la alia.*

**2 Kor 12:20** *Ĉar mi timas, ke veninte, mi iel ne trovos vin tiaj, kiajn mi volas; kaj ke mi mem estos trovata tia, kian vi ne volas; ke iel estos malpaco, ĵaluzo, koleroj, partioj, kalamnioj, murmurado, ŝveliĝoj, tumultoj;*

**Gal 6:1** *Fratoj, eĉ se homo estos trovita en ia kulpo, vi, kiuj estas spiritaj, restarigu tiun per spirito de mildeco; rigardante vin, ĉiu sin mem, por ke vi ne estu tentataj.*

LA PLEJ SUPERA REGULO  
POR LA KRISTANA VIVO  
ESTAS AMO

1 Joh 2

3) **Atletoj** scias, kion ili celas

**Heb 12:1-2** *Tial ankaŭ ni, havante ĉirkaŭ ni tian nubegon da atestantoj, formetu ĉion pezan kaj la pekon embarasantan, kaj persiste kuru la kuradon antaŭ ni metitan, direktante la rigardon al la aŭtoro kaj perfektiganto de la fido, Jesuo, kiu, pro la ĝojo antaŭ li metita, suferis la krucon, malestimante honton, kaj sidiĝis dekstre de la trono de Dio.*

## v.6 La Terkultivisto de Kristo – laboras kun La Semo

1) Kultivas la teron, semas, atendas ...

Ni plantas la semon foje sen tujaj rezultoj; ni devas scii atendi.

La instruisto foje instruas al la popolo sed ne rimarkas iun tujan ŝanĝon


Patro aŭ patrino rimarkas, ke iliaj filoj ne tuje ŝanĝiĝas

LA SANKTA SPIRITO ESTAS TIU, KIU IGOS LA SEMON KRESKI – NI NE PROVU FARI LA LABORON DE LA SANKTA SPIRITO

**1 Kor 3:5-9** *Kio do estas Apolos? kaj kio estas Paŭlo? Servantoj, per kiuj vi ekkredis; kaj ĉiu, kiel la Sinjoro al li donis. (6) Mi plantis, Apolos akvumis; sed Dio kreskigis. (7) Tial nek la plantanto estas io, nek la akvumanto; sed Dio, la kreskiganto. (8) Sed la plantanto kaj la akvumanto estas unu; sed ĉiu ricevos sian propran rekompencan laŭ sia laboro. (9) Ĉar ni estas kunlaborantoj kun Dio:vi estas la kultivotaĵo de Dio, la konstruotaĵo de Dio.*

- ✓ La soldato celas la triumfon.
- ✓ La atleto celas la kronon.
- ✓ La terkultivisto celas la fruktojn.

## Tie ĉi ni kongresos en 2007, en Pollando



# 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso

60-a de IKUE,

57-a de KELI

21- 28 Julio 2007 en Pelplin, Pollando

“... *Dio estas la amo* ...”

*La ĉefa ordono de Jesuo - kaj ni ... ?*

&

**8-a JET'07**

(8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro)

samtempe kaj samloke, sed ofte kun aparta programo

**J**esuo Kristo preĝas por la unueco de la kristanoj. Kaj ni? Kio komuna vivas kaj kreskas hodiaŭ en niaj kristanaj eklezioj? En ĉi tiu ekumena kongreso ni volas kune vivi kristane, preĝante kaj parolante por plia progreso de amo kaj unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo - en ni kaj inter ni. IKUE kaj KELI vokas la Kristanan Esperantistaron al **18-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Pelplin**, Pollando, proksime de Gdańsk kaj Malbork. Samtempe samloke okazas la **8-a Junulara Ekumena Esperant-Tendaro JET'07**. Atentu la favorajn prezojn por familioj kaj por grupoj - ŝanco, kunveni konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia Esperanto-kunveno. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaŭe grup-gvidanto aŭ gepatroj. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj, kaj paroligan kurson.

**PELPLIN** estas malgranda urbeto en norda Pollando proksime de Malbork. En Pelplin la kongresejo estos la Alta Seminario (supera porpastra seminario), Pl.Mariacki 2. Parto de la kongresanoj loĝas en Collegium Marianum, Pl. Cystersów 1, 100 m distance de la kongresejo. La JET-anoj loĝas en ZS nr.1 (la mezlernejo), ĉe la strato/ul. Sambora 5, ĉ. 500 m distance de la kongresejo Alta Seminario. La Katedralo, la Alta Seminario kaj la Collegium Marianum troviĝas en unu loko. En la Alta Seminario estas “Aula Magna” – granda salono, kelkaj pli malgrandaj aŭloj kaj refektorio (manĝejo). Ĉe Alta Seminario estas bela ĝardeno, en kiu partoprenantoj povas ripozi, promeni kaj mediti. Ducent metrojn de la seminario (kongresejo) estas bela palaco de dioceza episkopo Johano Bernardo Szlaga kun ankaŭ bela vizitinda ĝardeno.



**Ni kore invitas vin** aliĝi al nia 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso Pelplin 2007 Philippe COUSSON kaj Miloslav ŠVÁČEK, prezidantoj de KELI kaj IKUE Lajos KÓBOR kaj Bernhard EICHKORN de la Ekumena Komisiono Jadwiga WASIUK <jagaw53@poczta.onet.pl> kaj Edward KOZYRA <esperanto@powiat.malbork.pl> por la Loka Kongresa Komitato

Atentu la informojn daŭre aktualigotajn en: <http://www.Bernhard-Eichkorn.de>

## Provizora Kongresa program-skizo

**Vendredo, 20. julio 2007**

Akcepto: 16h-18h, 20h-21h

**Sabato, 21. julio 2007**

Akcepto: 10h-12h, 15h-17h, 19h-21h

18h15 Vespera manĝo

19h30 Inaŭgura vespero (kun ADORU)

**Dimanĉo, 22. julio 2007**

08h15 Matena manĝo

10h00 Solena Sankta Meso

10h30 Evangelia Diservo

13h00 Tagmeza manĝo

17h00 Ekumena Diservo (kun ADORU)

18h15 Vespera manĝo

19h30 Solena Malfermo

**Dumsemajna taga programo**

07h00 Sankta Meso (kun ADORU)

07h45 Ekumena matena preĝo (ADORU)

08h15 Matena manĝo

09h00 Komuna kantado (kun ADORU)

10h00 kaj 11h00: Prelegoj

12h30 Tagmeza preĝo (kun ADORU)

13h00 Tagmeza manĝo

16h00 kaj 17h00: Prelegoj

18h15 Vespera manĝo

20h00 Vespera programo

**Merkredo, 25. julio: tuttaga ekzkurso**

**Sabato, 28. julio 2007**

Adiaŭa Mateno

Hejmen-veturado

---

**Bus-organizantoj atentu:** Ni subvencias la organizadon de busa vojaĝo el ekster Pollando al Pelplin jene: Kiam via buso atingos Pelplin, vi ricevos 500 EUR por la buso (havanta minimume 9 okupitajn sid-lokojn) kaj po 10 EUR por ĉiu aliĝinta persono, kiu veturis kun via buso. Krome la bus-stiranto (en buso pli granda ol 9 sidlokoj) respektive la du bus-stirantoj de minimume 45-seĝa granda buso ricevas senkosta(j)n loĝ- kaj manĝ-loko(j)n dum la tuta semajno, se (i)li pretas, veturi buse al niaj ekskurs-lokoj kontraŭ pagado de la bezonata brulaĵo.

**Pelplin oni atingas:** trajne ĉiun duan horon de Gdańsk, tra Tczew /60 km/; de Tczew /stacidomo/ pli favore per buso /ĉiam post 40 minutoj. Aŭ trajne ĉiun trian horon de Bydgoszcz, 150 km al Pelplin. (En Pelplin de stacidomo kaj bus-stacio al kongresejo 600 m) per aŭtomobilo – land-vojon n-ro 1, forlasu ĝin en la vilaĝo Rudno al Pelplin. per aviadilo al la flughaveno ĉe Gdańsk, 68 km al Pelplin per trajno (vidu supre).

**La historio de Pelplin** estas ligita ĉefe kun monumenta katedrala baziliko. Konstruis ĝin la ordeno de Cistercianoj. Post kasacio de la ordeno komence de la 19-a jc. la cistercianan kulturon transprenis la loka eklezio, ekde 1992 la diocezo de Pelplin. En la urbo loĝas 17 mil homoj. Sur la tombejo troviĝas tombo de episkopo sufragano /esperantisto/ Konstanteno Dominik (estonta beatulo). En Dioceza Muzeo estas Biblio de Gutenberg.

Jadwiga WASIUK

**Aliĝilo** sendota al

Jadwiga WASIUK, Strzelnica 8, PL 83-130 Pelplin < jagaw53@poczta.onet.pl >

**Gedzjoj** sen infanoj, same **familioj** kaj **grupoj** bezonas nur unu aliĝilon.

**Gepatroj** kun infanoj utiligu ankaŭ la suban parton **B**.

**Grupestroj** utiligu ankaŭ la suban parton **C**.

A. Unuopulo/patro/grupestro: Nomo: \_\_\_\_\_  
**Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle**

Adreso: \_\_\_\_\_

Lando (en Esperanto): \_\_\_\_\_ telefono: \_\_\_\_\_

faks-numero: \_\_\_\_\_ reta adreso: \_\_\_\_\_

Sekso (*signu inter la krampoj*): ina ( ), vira ( ).

Ĉambro: (*kruc-signu vian deziron! atentu la prezojn en 5.1*)

Mi mendas: ( ) 1-litan ĉambrom en ( ) Alta Seminario **aŭ** en ( ) Coll. Marianum

**aŭ** ( ) 2-litan ĉambrom en ( ) Alta Seminario **aŭ** en ( ) Coll. Marianum,

**aŭ** ( ) 3-litan (nur en Collegium Marianum)

**aŭ** ( ) 4-litan ĉambrom (nur en Alta Seminario)

kun jena kunulo en mia ĉambro: \_\_\_\_\_

- ( ) Tio estas mia edzino, por kiu mi ne plenigas plian aliĝilon.

- ( ) Mi/ni volas partopreni nur dumtage sen kongresaj tranoktoj (*atentu 7.*)

- ( ) Mi/ni volas veni jam vendrede (*atentu 6.*)

**B. Aliĝo de familio** (*la patro aŭ la patrino plenigu la adreson de la familio supre ĉe A.*):

Nomo de la patro: \_\_\_\_\_

kaj de la patrino: \_\_\_\_\_

de la infanoj (*antaŭnomoj kaj enkrampe aĝo*): \_\_\_\_\_

( ) En nia ĉambro en Collegium Marianum loĝu kun ni jena infano en 3-lita ĉambro:

(*En Collegium Marianum disponiĝas nur 2- kaj 3-litaj ĉambroj; atentu la prez-altigojn 5.2*)

Nomo de tiu infano: \_\_\_\_\_

( ) Ni gepatroj volas loĝi en la Alta Seminario en 2-lita ĉambro (*prez-altigoj 5.2.*)

( ) Ni volas loĝi en la Alta Seminario kun 2 infanoj en 4-lita ĉambro (*prez-altigoj 5.2.*)

(*Tie disponiĝas nur 2- kaj 4-litaj ĉambroj*)

Nomoj de tiuj du infanoj: \_\_\_\_\_

(*Se estas pli da infanoj, bv. klarigi viajn dezirojn en aparta folio*)

( ) Jenaj infanoj loĝu en ĉambro apud la nia: \_\_\_\_\_

(*Tio nur eblas, se estas 2 aŭ 4 infanoj en Alta Seminario, aŭ 2 aŭ 3 en Marianum. Se la nombro ne konvenas al via familio, bv. skribi tion aparte kaj ni serĉos solvon.*)

**Manĝoj:** (normale vi ricevas tri manĝojn – matene, tag-meze kaj vespere)

( ) Mi/ni deziras vegetarajn manĝojn

**Ekskursoj:**

Mi/ni ne volas partopreni ekskurson: al ( ) Malbork, Kastelo;

al ( ) Gdańsk

Mi proponas jenajn miajn **kontribuojn** al la kongresa programo (temo, daŭro):

(En la limigita tempo de la kongreso ne ĉiuj ofertoj povas esti prezentataj - uzu apartan folion!)

---

**C. Aliĝo de grupoj.** Se estas pli ol 6 personoj, tiuj 7 ĝis 12 estas dua grupo kun dua ĉambroj.

1. Grupa responsulo (Nomo de 1.): \_\_\_\_\_

Mi konfirmas, ke ni jam komencis lerni Esperanton.

Mi anoncas, ke venos jenaj pliaj grupanoj; 1. aŭ 2. dormos kun ili en la Mezlernejo.

2. Grupa vic-responsulo: \_\_\_\_\_ aĝo \_\_\_\_\_

3. Grupano: \_\_\_\_\_ aĝo \_\_\_\_\_

4. Grupano: \_\_\_\_\_ aĝo \_\_\_\_\_

5. Grupano: \_\_\_\_\_ aĝo \_\_\_\_\_

6. Grupano: \_\_\_\_\_ aĝo \_\_\_\_\_

**D.** ( ) Mi/ni volas veni jam vendrede pagante por la tranokto(j) dekonon de la kongresa prezo (vidu sube), sed mi/ni mem zorgas por la manĝoj ĝis sabate 18h15.

Dato/loko/subskribo: \_\_\_\_\_

**La aliĝo validas post alveno de la aliĝ-sumo de ĉiu persono escepte de infanoj ĝis 6 jaroj.**

**Kongresa Kaso:** Pagu la aliĝ-sumon al jena banka konto:

BANK SPÓLDZIELCZY W SKÓRCZU, ODDZIAŁ W PELPLINIE, WASIUK  
JADWIGA – EEK, 12834200092007389930000001 (en Złoty/zlotoj).

**aŭ:** GOSPODARCZY BANK WIELKOPOLSKI POZNAŃ – GBWCPLPP, WASIUK  
JADWIGA – EEK, 12834200092007389930000001 (en eŭroj).

**el Eŭropa Unio:**

Bernhard EICHKORN, K-to 21193704 ĉe Postbank Stuttgart BLZ 60010070, IBAN:  
DE95 6001 0070 0021 1937 04; BIC: PBNKDEFF

**aŭ ĝenerale:** UEA-konto echk-x de Bernhard EICHKORN. Tiam nepre informu lin:

B.Eichkorn, Romäusring 20, D 78050 Villingen <Bernhard.Eichkorn@esperanto.de>

Pagoj en Pelplin povas esti en Złoty/zlotoj (laŭ la aktuala kurzo) aŭ en eŭroj.



**Prezoj: Tarifo A:** Iamaj socialismaj landoj escepte de la iama GDR, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko) kaj Latina Ameriko. **Tarifo B:** Ĉiuj landoj escepte de A. Prezoj en eŭroj, €

**4. Kongresa aliĝ-sumo:** pagenda al la Kongresa Kaso, kontojn vidu apude (*por validigi la aliĝilojn kaj ne repagebla, por infanoj ĝis 6 jaroj vi ne pagas aliĝ-sumon*)

ĝis 31.12.2006: A: 10 €; A: 50 €;

ekde 1.1.-31.3.2007: A: 25 €; A: 60 €;

ekde 1.4.2007: A: 40 €; A: 70 €;

**5.1. Kongrez-prezo** (*aldone pagenda en la kongresejo*) kun tranoktoj kaj po tri manĝoj (unua manĝo 21.7.2007 je 18h15; lasta manĝo 28.7.2007 je 08h15) (*IKUE kaj KELI-membroj pagos 20 € malpli ol indikite. Kunportu vian membro-kotiz-kvitancon 2007 por pruvi vian membrecon!*)

(prezo por 1 persono)	<u>1-lita ĉambro</u>	<u>2-lita ĉambro</u>	<u>3-lita</u>	<u>4-lita</u>	
Alta Seminario:	( ) 280 €	A: ( ) 180 €	B: ( ) 220 €	-	( ) 140 €
Coll. Marianum:	( ) 220 €	A: ( ) 140 €	B: ( ) 180 €	( ) 110 €	-

**5.2. Familio** estas min. patro aŭ patrino kaj min. unu infano ĝis maks. 25 jaroj; maks. patro kaj patrino kun iliaj infanoj malpli ol 26-jaraj. Familio pagas 180 €. La gepatroj loĝas en Coll. Marianum kun laŭvole unu infano en sia ĉambro aldonante 20 €. Pliaj infanoj loĝas kun aliaj infanoj aŭ gejunuloj en la Mezlernejo - knaboj kaj knabinoj aparte. La gepatroj povas loĝi en la Alta Seminario solaj (aŭ kun du infanoj en kvar-lita ĉambro) aldonante po 40 € por ĉiu familiano loĝonta tie. Se la gepatroj volas loĝigi pliajn el siaj infanoj en Collegium Marianum en ĉambro proksime de la gepatra, ili pagu 20 € aldone por ĉiu infano loĝonta tie.

**5.3. Grupo** estas gejunuloj, kiuj ankoraŭ ne estas 26-jaraj antaŭ 29.7.2007. La grup-estro kaj la vic-grupestro povas esti pli aĝaj, sed unu el ili devas dormi kun la grupo en la Mezlernejo. JET'07 havas kelkajn apartajn programerojn. Unu grupo pagas 360 € sendepende, ĉu ili estas 6-personoj aŭ malpli. Ĉiu IKUE- aŭ KELI-membro de la grupo ricevas, kontraŭ monro de la kvitanco de sia pago de la membro-kotizo, prez-redukton de tio, kion li pagis por 2007. La plen-aĝaj responsuloj de la grupoj kaj la aliaj partoprenantoj de JET helpas en la porjunula kaj porinfana programoj.

**6.** Kiu volas veni jam **vendrede**, povas tranokti pagante por la tranokto dekonon de la kongresa prezo, sed li mem zorgu por la manĝoj ĝis sabato 18h15.

**7.** Prezo **sen kongresaj tranoktoj**, sed kun du manĝoj tage: ( ) 200,- Złoty/zlotoj.

**8.** La libro **ADORU** estas grava parto de la 18-a EEK. Ĉiu aliĝanto, kiu montras sian propran libron kun sia enskribita nomo, ricevas prez-redukton de 10 € en sia kongres-prezo. La aliaj (ankaŭ la grupanoj) ricevas unu libron ADORU, kiun ili povas redoni je la fino de la kongreso ricevante 5 €. La aliaj 5 € estas lu-prezo por la dum-semajna uzado de la libro. Familioj devas havi unu libron por du personoj, kiuj povas legi.

**9. IKUE- kaj KELI-membroj** pagas 20 € malpli ol ne-membroj (la KELI-jarkotizon, dumkongrese ankaŭ validas por IKUE). Validas la membro-listoj de IKUE kaj KELI aŭ la kvitanco de pago de la membro-kotizo por 2007. Oni rajtas ĉe la kongresa kaso aliĝi al unu el ambaŭ organizoj laŭ la hejmlanda aliĝ-prezo konfirmita de IKUE kaj KELI, kaj tiam oni pagas la je 20 € reduktitan kongres-prezon.

# Perloj de Saĝeco: La Sentencoj de Salomono

Kompilis Jerry VEIT, Usono

**L**a *Sentencoj de Salomono* apartenas al la tiel nomataj saĝecaj libroj de la Malnova Testamento, kune kun ekzemple Ijob, Predikanto, kelkaj el la Psalmoj, Saĝeco de Salomono kaj Sirah (la du lastaj el la Duakanonaj Libroj).

Fakte la Sentencojn verkis diversaj aŭtoroj kaj ne nur Reĝo Salomono mem. Tamen laŭ 1. Reĝoj 4:31-32, “*li estis pli saĝa, ol ĉiuj homoj*” kaj eldiris tri mil sentencojn kaj verkis pli ol mil kantojn.

La Sentencoj konsistas plejparte el praktikaj konsiloj por bona kaj morala konduto en la surtera vivo, taŭgaj por “*scii saĝon kaj moralinstruon; por kompreni parolojn de prudento*” (Sentencoj 1:2). Mankas grandaj teologiaj temoj, tamen la lingvaĵo de la Sentencoj de Salomono estas simpla kaj direkta, kaj ili restas tre legindaj ankoraŭ al la homoj de hodiaŭ.

Jen malgranda, iom hazarda elekto el ili:


- Kiu malŝatas sian proksimulon, tiu estas pekulo; sed kiu kompatas malriĉulojn, tiu estas feliĉa. (Sen 14:21)
- Kiu celas bonon, tiu atingos plaĉon; sed kiu serĉas malbonon, tiun ĝi trafos. (11:27)
- Via koro sin tiru ne al pekuloj, sed al timo antaŭ la Eternulo ĉiutage. Ĉar ekzistas estonteco, kaj via espero ne perdiĝos. (23:17-18)
- Pli bone estas esti humila kun malriĉuloj, ol dividi akiron kun fieruloj. (16:19)
- Ne fanfaronu pri la morgaŭa tago; ĉar vi ne scias, kion naskos la tago. (27:1)
- Animo benanta ĝuos bonstaton; kaj kiu trinkigas, tiu mem havos sufiĉe por trinki. (11:25)
- Kaj la vojo de piuloj estas kiel lumo leviĝanta, kiu ĉiam pli lumas ĝis plena tagiĝo. (4:18)
- Pli bona estas malriĉulo, ol homo mensogema. (19:22b)
- Kiu mokas malriĉulon, tiu ofendas lian Kreinton; kiu ĝojas pri ies malfeliĉo, tiu ne restos sen puno. (17:5)

- Kiel frenezulo, kiu ĵetas fajron, sagojn, kaj morton, tiel estas homo, kiu trompas sian proksimulon kaj diras: mi ja ŝercas. (26:18-19)
- Kiu donas al malriĉulo, tiu ne havos mankon; sed kiu kovras siajn okulojn, tiu estas multe malbenata. (28:27)
- Alia vin laŭdu, sed ne via buŝo; fremdulo, sed ne viaj lipoj. (27:2)
- Kiel malvarma akvo por suferanto de soifo, tiel estas bona sciigo el lando malproksima. (25:25)
- Milda respondo kvietigas koleron; sed malmola vorto ekscitas koleron. (15:1)
- La buŝo de malsaĝulo estas pereu por li, kaj liaj lipoj enretigas lian animon. (18:7)
- Fidu la Eternulon per via tuta koro, kaj ne fidu vian prudenton. Konsciulo Lin en ĉiuj viaj vojoj, kaj Li ĝustigos vian iradon. (3:5-6)
- Transdonu al la Eternulo viajn farojn; Tiam viaj entreprenoj staros forte. (16:3)
- Pli bona estas seka peco da pano, sed kun trankvileco, ol domo plena de viando, kun malpaco. (17:1)
- Nomo bona estas pli preferinda, ol granda riĉeco; kaj bona estimo, ol arĝento kaj oro. (22:1)

∞

## Preĝejaj tur-kokoj

Bengt Olof ÅRADSSON, SE



**E**n Svedio ekzistas proksimume 620 preĝejoj kun kokoj sur siaj turoj. La kutimo venis al Svedio dum la 16-a jarcento el meza Eŭropo, kie la kutimo evoluis dum la mezepoko. La signifo ne estas tute certa, sed povas esti, ke la koko reprezentas la atentemon kaj gardemon. La kokoj samtempe funkcias kiel ventomontriloj.

En Svedio formiĝis societo en la 70-aj jaroj, kiu depost 1979 elektas la “tur-kokon de la jaro”.

Laŭ informo, en Francio nur la nobelaro rajtis posedi ventomontriloj dum la mezepoko.



# Pri la libreto



Cipriano: La Unueco de la Katolika Eklezio

Serio: Voĉoj kristanaj, n-ro 25  
Verkis/tradukis: Gerrit BERVELING  
Paĝoj: ĉ. 40  
Mendu ĉe: UEA aŭ la aŭtoro  
Prezo: 2.40 € + afranko  
Recenzis: Bengt Olof ÅRADSSON

**M**i tralegis kun granda ĝojo kaj intereso la libreton pri/de Cipriano, la episkopo en Kartago, kiu en la jaro 258 mortis kiel martiro. La jarojn priskribitajn en la Nova Testamento kaj post la reformacio mi sufiĉe bone konas, sed ne la jarojn intertempajn. Kio okazis post la tempo de la Agoj? Kio kaŭzis la kristanismon evolui en sia (ne)rekta vojo al la moderna tempo? Kiel la unuaj kristanoj pensis kaj agis? Ekzistas granda blanka paĝo en mia scio. La jena libreto el la serio Voĉoj kristanaj iom plenigas tiun mankon.

Cipriano naskiĝis en Kartago, la ĉefurbo en la romia provinco Afriko. Iam inter la jaroj 245 kaj 247 li baptiĝis. Nur unu-du jarojn poste li estis elektita episkopo. Pro sia opinio en diversaj temoj li ankaŭ ricevis/kreis kontraŭulojn kaj interne kaj ekster la eklezio. Li finfine estis mortkondamnita en jaro 258. Restas valoraj leteroj kaj traktaĵoj de li. Ili montras al ni iom pri la tiutempa eklezia vivo. Inter la traktaĵoj troviĝas la jena: *La Unueco de la Katolika Eklezio*.

La libreto enhavas mallongan bibliografion; la *Prokonsulaj aktoj*, kiu priskribas la proceson kaj lian martiriĝon; kaj la menciitan traktaĵon de Cipriano.

Legante la priskribon pri Cipriano, kaj liajn proprajn vortojn kaj pensojn, mi ekhavis la impreson, ke ili tiutempe travivis multajn similajn problemojn, kiel la eklezio nuntempe spertas. Kie estas la ĝusta vojo kaj kiel nia kredo igas nin agi?



La libreton mi facile legis, kelkajn vortojn mi tamen devis serĉi. Mi preferus se la mallongigoj de la bibliaj referencoj havus la saman tri-literan sistemon kiel en ADORU. Nun mi ne tuj ekkomprenis pri kiu libro temis. Mi volonte rekomendas la libreton al tiuj kiuj volas, kiel mi, ekkoni iom pri la tempo inter la Agoj de la apostoloj kaj la reformacio.

# Patrino perdinta filinon

Mu Binghua, Ĉinio

Tiu ĉi rakonto estas vera afero, kiu antaŭ ne longe okazis en nia urbo. Ĉirkaŭ ni ĉiam ekzistas kompatindaj homoj. Inter ili la plejmulto estas virinoj kaj infanoj. Se ili havas noblan spiriton, necesas ke ni iamaniere laŭdas ilin.

M.B.

Ŝi estas vilaĝa virino, ordinara kiel teraĵo sub niaj piedoj. Ŝi iam havis unu filinon kaj tre bone prizorgis ŝin, same kiel ĉiuj patrinoj en la mondo traktas intime siajn proprajn gefilojn.

Kiam la juna filino kapablis stumbladi sur intervilaĝa vojeto, foje en bazaro ŝi perdiĝis en la popolanaj amasoj. La patrino ĉie serĉis kaj serĉadis la filinon, sed neniiĝis ĉiuj ŝiaj klopodoj. Ŝi ne trovis tiun ĉi amindan infaneton. Oni asertis, ke ŝia filino malaperis kaj estis simila al akvo, kiu vaporigis.

Sed ŝi ne volonte akceptis tian malsukceson, ŝi ĉiam kredis, ke ŝia filino eble estas adoptita de iu homo. Ĉiujare kiam infanĝardeno komencis novan semestron, ŝi certe staris ĉe ĝia enirejo, pririgardante ĉiun infanon, por scii, ĉu ŝia filino estas inter ili. Ofte preskaŭ ĉiuj, kiuj preterpasas ŝin, konsideris ŝin kiel virinon havantan psikajn problemojn.


Ŝi tamen tute malatentis pri tiuj onidiroj. En ĉiu infanĝardeno en la urbo ŝi senescepte postlasis siajn piedsignojn.

Tia serĉado daŭris 20 jarojn.

Post 20 jaroj, sur la muro de ŝia dormoĉambro ankoraŭ estas algluita la novjara bildo de la jaro 1986, nur ĉar tiu ĉi bildo estis algluita de ŝi kune kun sia filino. Ŝi rezervis ankaŭ la malgrandan ombrelon de la filino. Ŝi diris, ke la filino uzis la belan ombrelon nur unufoje. Ĉiufoje kiam la patrino disetendis ĝin, ŝi ĉiam ploretis, murmurante tra dentoj: “la ombrelo estas tro malgranda, mia filino ne plu povas uzi ĝin.”

Dum tiuj ĉi 20 jaroj, ŝi vivis nur por serĉado de la perdita filino. Kaj pro tio ĉiuj vilaĝanoj estis profunde kortuŝitaj. Multaj el ili helpis ŝin diversmanierie.

Ŝiaj faroj el la serĉado finfine kaŭzis zorgon de la gazetara rondo; en la urba instanco pri civila administrado la rondo



speciale por ŝi konsultis la originalan noton pri adopta stato en la jaro 1986.

Oni venkis multajn malfacilaĵojn kaj finfine trovis ŝian filinon. Ŝi vivas en la familio de iu urbano en la najbara urbo.

Ŝia deziro vidi sian filinon baldaŭ realiĝos!

Sed la familio, kiu restigis kaj adoptis ŝian filinon, sendis informon al la patrino, ke ŝia filino en ilia hejmo vivas tre normalan vivon; ŝi tute ne scias, kiuj estas ŝiaj propraj gepatroj; efektive ŝi jam prenas la adoptajn gepatrojn por la veraj paĉjo kaj panjo. Laste la sendito havis aldonon, aparte emfazatan, tio estas, se la patrino volus, ke ŝia filino estos ankoraŭ en la originala trankvilo,

do adoptinta familio sincere konsilis: “estas plej bone, ke oni ne lasu la filinon ekscii la aferon pri adopto.”

De 20 jaroj ŝi ĉiam esperis revidi sian filinon, sed nun ŝi tamen elektis retiriĝon. Ŝi timis, ke ŝia apero antaŭ tiu ĉi de longe perdita filino kaŭzos surprizan ĝenaĵon, tiel ke la kvietaj vivo de la adoptinta familio estos rompita de ŝi.

Multaj diras, ke ŝi estas stulta kaj estas mola la koro. Sed tia stulteco kaj tiel mola koro ja estas kortuŝaj. Multaj vilaĝanoj foje larmis pro ŝia forrifuzo de intervido kun ŝia propra filino.

Nu, en nia mondo persono, kiu portas ŝarĝojn de la homa vivo kaj emas oferi sin okaze de ia granda ĉagreno, plej ofte estas nia patrino. ☺



*Mi ĉerpas el letero kiu jam printempe alvenis de nia frato MU Binghua./Red.*

Mi vivas en Ĉinio, kie ekzistas nur malmultaj kristanoj. ... Nia urbo havas grupeton pri kristanismo; la grupeto en sia kunveno legas kaj pridiskutas iun artikolon el Dia Regno tre ofte.

S-ro prezidanto pravas [novjara saluto en 1/2006]. La celoj de nia ligo devas esti laboreblaj kaj pli oportune praktikeblaj. Manko de viglaj kaj spertaj membroj estas nun tre ĝenerala fenomeno preskaŭ por ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en la mondo. Unuflanke centoj kaj miloj da junuloj volonte posedas la anglan lingvon, aliflanke multe da modernaj homoj pro iu kaŭzo ne emas serĉi spiritan nutradon el nia religio kristanismo. Ambaŭ flankoj faras nian ligon ege malfacila. Sed ni ne perdu nian kredon je Jesuo Kristo. Tiu ĉi kredo helpas nin sendube.

Apud mia hejmo troviĝas malgranda librovendejo. Ĝi vendas la oficialan organon de la Ĉina Kristanisma Ligo. La nomo de la organo estas “*Vento el ĉielo*”. Ĝi, en la ĉina lingvo, estas malmultekosta. Se iuj gefratoj volas havi ĝin, bonvolu skribu al mi. Kompreneble, se vi petas de mi aliajn ĉinajn librojn kaj gazetojn, mi povas ankaŭ doni helpon.

S-ro MU Binghua; Honghua nanlu 38 hao; 610081, Chengdu; CHINA

# Informaĵoj

## Adresŝanĝoj

### Wolfram Rohloff

Markt 82,  
D-09517 Zöblitz,  
Germanio  
tel +49 / 37363 / 4423.

### Arne Lundkvist

Vattenfallsgatan 2  
S-561 39 Huskvarna  
Svedio  
tel: +46-36-174653

(Malnova adreso : Burgstraße 8,  
04651 Bad Lausick, Germanio.)

---

## Korektoj

al la “Impresoj de la 56-a KELI-kongreso”, Dia Regno 4/2006:

- **nomoj estas** - VRCHLABÍ, KRKONOŠE kaj JILEMNICE
- **partoprenis** el 10 landoj - mankas Aŭstrio kaj Rusio
- **Pavel Klimeš** estas diakono kaj poste pastoro (ne pastro)
- **Klášterní kostel** estas Monaĥeja preĝejo
- **Strážné** signifas proksimume “gardistejo”.

---

## Kelkaj rimarkoj

al miaj kontribuoj en Dia Regno 4/2006:

**Biblio-lingvoj:** La tria planlingvo estas verŝajne Interlingua.

**Selektitaj memortagoj 2006:** Eble la rimarkoj bezonas klarigon, speciale se temas pri Mohamedo, Newton kaj Jesuo. La libro estas verkita de Michael H. Hart kaj aperis en Usono; mi citas el la germana traduko. Memkomprenble la vicigo de la personoj estas malfacila afero kaj la opinio de la aŭtoro. Kriterio por li estis la longdaŭra influo al la historio kaj la mondo, ne la homa egeco. En la libro ĉiu persono havas ampleksan biografion kaj motivigon pro la vicigo.

Salutas korege Siegfried

# Ĉar vi elektis

1. Ĉar Vi e - lek - tis, vi - vi en mal - ri - ĉec'

2. Ĉar Vi obeis  
ĝis la ekstrema sort',  
surkruca morto,  
konas ni venkon,  
scias pri grand-potenc',  
konas ni Dion.

vi - von ho - me - can, ĉar Vi ne kro - nis

3. Ĉar Vi sobiris  
al homoj en sufer',  
al la pekintoj,  
scias ni, ke ne  
solaj iradas ni;  
konas nin Dio.

Vin per Di - e - ca glor', ko - nas ni

4. Tial proklamos  
ĉiuj vunditoj kaj  
ĉiuj mortontoj,  
ĉiuj pekintoj  
kun tuta sanktular'  
Kriston Sinjoro.

Di - on. jo - ro.

5. Tial konfesos  
mondoj kaj kreitar',  
ĉio estinta,  
nuna, venonta,  
ĉio en unuec'  
Kriston Sinjoro.

Harp' N116 • # NOVA TESTAMENTO 05.05 • 0##b (1)

Kp: Flp 2:6-11

FÖR ATT DU INTE \* SPB 38 b \* M: Börje Ring 1975 \* sveda T: Olof Hartman  
1970 \* E: Åke Ahlrén 2002/2004, kun afablaj permesoj